

Sociekonomiaj temoj en la centro de la plenkunsido de la kubaj komunistoj



Havano, dec 9 (RHK) Prezidite de la unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo (CC-PCC) kaj Prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel sesiis ĉi-vendrede, en Havano, la 5a Plenkunsido de tiu politika organizo kiu daŭros ĉis morgaŭ kun rigardo al la kernaj problemoj de la kuba socio.

"Ni estas mobilizitaj de la fido al la venko, kiun testamentis al ni ĉefkomandanto Fidel Castro Ruz, sintezita de la arme-generalo Raúl Castro Ruz, kiam li esprimis: jes eblis, jes eblas kaj ĉiam eblas!", diris la sekretario de Organizo de la PCC, Roberto Morales Ojeda en la raporto de la Politika Buroo, kiu generis larĝan debaton.

La komunistoj analizis la interkonsentojn de 2a, 3a kaj 4a plenaj kunsidoj, inter ili la progreso de la Projekto de akvokondukilo Oriento-Okcidento, la plibonigo de la laboro de la Popola Povo, la revigligo de la laborstrategioj de la Federacio de Kubaj Virinoj kaj la Unio de Junaj Komunistoj, krom la produktado de sukerkano.

La evento komenciĝis per minuto da silento kiel omaĝo al Generalo de Divizio Luis Alberto López-Callejas, membro de la Politika Buroo, kaj generalo de brigado José Alberto Yanes Díaz, membro de la CC-PCC, kiuj ambaŭ mortis kaj havis longan revolucionan karieron dediĝitan al la Patrujo.

La partia kunveno ankaŭ ratifis la gravecon laŭdi la rolon de la laboristoj en la elektra sektoro, dum ŝi pledis por informi la loĝantaron pere de la gazetaro kaj ciferecaj platformoj kaj pliiĝi la komunikadan kampanjon celantan la uzon racia kaj ŝparado de energio.

Pliaj 11 temoj estis diskutitaj, same kiel la sama nombro da politikoj kaj skizaj leĝaj dispozicioj.

La unuan tagon de la 5a Plena Sesio de la CC-PCC aparte partoprenis komandantoj José Ramón Machado Ventura kaj Ramiro Valdés Menéndez.

Fonto: @PartidoPCC y @DrRobertoMOjeda

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/307531-sociekonomiaj-temoj-en-la-centro-de-la-plenkunsido-de-la-kubaj-komunistoj>



Radio Habana Cuba